

21 MALAPERO DE AKTORO BENDA

La duan de septembro malaperis aktoro Benda, majstro Jan Benda, kiel oni nomis lin ekde tiu tempo, kiam li per unu sola impeto atingis la plej altan rangon de la aktora gloro. Nome la duan de septembro okazis tute nenio; la helpservistino veninta je la naŭa matene ordigi loĝejon de Benda, trovis malsternitan liton kaj la tutan porkan malordon, kutime ĉirkaŭantan Benda'n, nur la majstro ne estis hejme; sed ĉar tio ne estis io neordinara, ŝi reordigis rapidmaniere la loĝejon kaj iris sian vojon.

Bone. Sed ekde tiu tempo aktoro Benda restis malaperinta. Sinjorino Marešová (nome la helpservistino) ne tro miris pri tio; mi petas, la aktoroj estas kiel ciganoj; kiu scias, kien li veturis ludi aŭ filmi. Sed la dekan de septembro komenciĝis la serĉado de aktoro Benda; li estis irona en teatron, kie komenciĝis provoj je Reĝo Lear; kiam Benda ne venis ankaŭ al la tria provado, tio vekis tamen nur maltrankvilon kaj el la teatro oni telefonis al doktoro Goldberg, amiko de Benda, ĉu li scias, kio okazas kun Benda.

Tiu doktoro Goldberg estis kirurgo kaj akiradis egajn sumojn je apendicitoj; tio estas tia juda specialaĵo. Alie li estis dika homo kun dikaj oraj okulvitroj kaj dika ora koro; li ardis por arto, havis loĝejon pendkovritan de planko ĝis plafono de nuraj bildoj kaj sindone amis aktoron Benda, kiu kondukis al li kun amika malestimo kaj kun ia degno permesadis al li pagi por li; kio, inter ni, tute ne estis bagatelo. Tragika masko de Benda kaj radiantata vizaĝo de doktoro Goldberg (kiu trinkis nur akvon), tio jam apartenis al si ĉe ĉiuj sardanapalaj diboĉoj kaj sovaĝaj ekscesoj, kio estis la dua flanko de la fama granda mimo.

Do al tiu doktoro Goldberg oni telefonis el la teatro, kio ja okazas kun Benda. Li respondis, ke li eĉ ne scietas, sed ke li serĉos lin; kion li ne diris, estis, ke li mem jam la tutan semajnon lin serĉis en ĉiuj noktlokaloj kaj ekskurshoteloj kun kreskanta maltrankvilo;

21 ZMIZENÍ HERCE BENDY

Druhého září zmizel herec Benda, mistr Jan Benda, jak se mu říkalo od té doby, co jediným rozběhem vystoupil na jednu z nejvyšších příčí herecké slávy. Totiž druhého září se nestalo docela nic; posluhovačka, která v devět hodin ráno přišla poklidit Bendův byt, našla zvalenou postel a celý ten kančí nepořádek, který obyčejně Bendu obklopoval, jenom pan mistr nebyl doma; ale jelikož na tom nebylo nic neobvyklého, dala byt svým sumárním způsobem do pořádku a šla zase po svém.

Dobrá. Ale od té doby nebylo po herci Bendovi ani památky. Paní Marešová (totiž ta posluhovačka) se nepodivila příliš ani tomu; prosím vás, tihle herci, to vám je jako cikáni; kdopak ví, kam zas jel hrát nebo flámovat. Ale desátého září se strhla po herci Bendovi sháňka; měl přijít do divadla, kde se začínaly zkoušky na Krále Leara; když Benda nepřišel ani na třetí zkoušku, vzbudilo to přece jen nepokoj a z divadla telefonovali doktoru Goldbergovi, Bendovu příteli, neví-li, co se děje s Bendou.

Ten doktor Goldberg byl chirurg a vydělával ukrutné peníze na slepých střevech; to už je taková židovská specialita. Jinak to byl tlustý člověk s tlustými zlatými brýlemi a tlustým zlatým srdcem; hořel pro umění, měl byt od podlahy po strop ověšený samými obrazy a oddaně miloval herce Bendu, který k němu choval přátelské opovržení a s jistou blahosklonností mu dovoľoval, aby za něj platil; což, mezi námi, nebyla zrovna maličkost. Tragická maska Bendova a zářící obličej doktora Goldberga (který pil jenom vodu), to už patřilo k sobě při všech těch sardanapalských flámech a divokých výtržnostech, které byly druhou stránkou proslulosti velkého mima.

Tedy tomu doktoru Goldbergovi telefonovali z divadla, co prý se děje s Bendou. Odpověděl, že nemá ponětí, ale že se po něm podívá; co neřekl, bylo, že už ho sám po celý týden shání po všech nočních lokálech a výletních hotelech s rostoucím znepokojením;

li havis angoran antaŭsenton, ke al Benda io okazis. Nome ĝi estis tiel: doktoro Goldberg estis, laŭ tio kiom li povis konstati, la lasta, kiu vidis Jan'on Benda. Je fino de aŭgusto ankoraŭ li entreprenis kun li triumfan marŝon tra la nokta Prago; sed poste Benda jam venis al neniuj kutimoj kunveni.

Eble li malsanas, diris al si fine doktoro Goldberg kaj veturis foje vespere al la loĝejo de Benda; tio estis ĵus la unuan de septembro. Li sonorigis ĉe pordo; neniuj venis malfermi, sed interne estis aŭdebla ia brueto. Tial la doktoro tremsonigis almenaŭ dum kvin minutoj la sonorileton; subite aŭdiĝis paŝoj kaj la pordo malfermiĝis; en ĝi staris Benda en negliĝa surtuto, kaj doktoro Goldberg konsterniĝis: tiel sovaĝe aspektis la glora aktoro kun taŭzita kaj glua hararo kaj barbo ne razita minimume semajnon; li ŝajnis esti malgrasa kaj malpura. "Ha, tio vi estas," li diris malafable, "kion vi volas?"

"Miadio, kio, kio okazis al vi?" ekvortis la doktoro ege mirante. "Nenio," murmuris Benda. "Nenien mi iros, ĉu vi komprenas? Lasu min trankvila!" Kaj fermis la pordon antaŭ la nazo de Goldberg. Tagon post tio li malaperis.

Doktoro Goldberg okulvitris zorgoplene tra siaj dikaj vitroj. Io ne estis ĉi tie en ordo. De domzorganto, kie Benda loĝis, li eksciis nur tion, ke antaŭ nelonge nokte, eble ĝuste la duan de septembro, haltis ĉirkaŭ la tria matene aŭto antaŭ la domo; sed neniuj elaŭtiĝis, nur hupis, donante al iu en la domo signon. Poste estis aŭdeble, ke iu eliras el la domo kaj brufermis post si la dompordon; poste la aŭto forveturis. Kia aŭto ĝi estis, vana demando. La domzorganto ne iris ĝin rigardi; je la tria matene oni ne ellitiĝas, se ne necesas. Sed la hupo sonis, kvazaŭ oni ege hastus kaj ne povus tempeton atendi.

Sinjorino Marešová depoziciis, ke sinjoro majstro dum la tuta semajno ne eliris el la loĝejo (eble nur nokte), ne razis sin kaj eble eĉ ne lavis sin, laŭ la aspekto; manĝaĵon li igis alporti al si hejmen, drinkis konjakon kaj kuŝiĝis sur sofo; jen ĉio.

měl tísnivou předtuchu, že se něco Bendovi stalo. To bylo totiž tak: Doktor Goldberg byl, pokud mohl zjistit, poslední, kdo Jana Bendu viděl. Někdy koncem srpna s ním ještě podnikl triumfální tažení noční Prahou; ale pak už Benda nepřišel na žádnou obvyklou schůzku.

Snad stůně, řekl si konečně doktor Goldberg a zajel si jednou večer do Bendova bytu; bylo to právě prvního září. Zvonil u dveří; nikdo nešel otevřít, ale uvnitř bylo slyšet nějaký šramot. Tu drnčel doktor dobrých pět minut na zvonek; najednou zazněly kroky a dveře se otevřely; stál v nich Benda zahalený v županu, a doktor Goldberg se ho zděsil: tak zdivočele vypadal slavný herec s rozčuchanými a splepenými vlasy a vousy dobrý týden neholenými; zdál se přepadlý a špinavý. "A, to jste vy," řekl nevlídně, "co chcete?"

"Proboha, copak se s vámi stalo?" vyhrkl doktor užasle. "Nic," zavrčel Benda. "Nikam nepůjdu, rozumíte? Dejte mi pokoj!" A zavřel dveře Goldbergovi před nosem. Den nato tedy zmizel.

Doktor Goldberg brejlil ustaraně svými tlustými skly. Něco tu nebylo v pořádku. Od domovníka baráku, kde Benda bydlel, zvěděl jenom to, že onehdy v noci, snad to bylo zrovna na druhého září, zastavilo asi ve tři hodiny ráno před domem auto; ale nikdo nevystoupil, jen troubil na houkačku, jako by dával někomu v domě znamení. Pak bylo slyšet, že někdo vychází z domu a zabouchl za sebou domovní vrata; potom auto odjelo. Jaké to bylo auto, kdepak, na to se domovník nešel podívat; ve tři hodiny ráno člověk neleze z postele, když nemusí. Ale ta houkačka troubila, jako by ti lidé měli hrozný kvál a nemohli chvilku čekat.

Paní Marešová vypověděla, že pan mistr celej tejden nevyšel z bytu (leda snad v noci), neholil se a snad se ani nemyl, jak vypadal; jídlo si nechal nosit domů, chlatal koňak a válel se na sofa; to jako je všecko.

Nun, kiam komencis interesiĝi pri malapero de Benda ankaŭ aliaj homoj, iris doktoro Goldberg denove al sinjorino Marešová. "Aŭskultu, sinjorino Marešová," li diris, "kiun veston surhavis sinjoro Benda, kiam li foriris el sia loĝejo?"

"Neniun," diris sinjorino Marešová, "jen ĝuste tio, kio ne plaĉas al mi. Mi konas ĉiujn liajn vestaĵojn kaj ĉiuj pendas en la loĝejo - eĉ ne unu pantalonon mankas." "Ĉu eble li foriris en subvesto?" opiniis doktoro Goldberg tre surprizite. "Eĉ ne en la subvesto," klarigis sinjorino Marešová, "eĉ ne en ŝuoj; jen kio estas stranga, sinjoro. Vidu, mi notis ĉiun lian tolaĵon, ĉar mi portas ĝin en lavbutikon; antaŭ nelonge oni ĝin lavis kaj ĉion mi reordigis al li kaj kalkulis; li havas dekok ĉemizojn, mankas nek unu, nek unu poŝtuko, nepre nenio. Nur unu kofreto estas for, tiun li ĉiam kunprenas. Se li foriris, do li devis esti, krom la kara animo, tute nuda."

Doktoro Goldberg mienis tre serioze. "Sinjorino," li diris, kiam la duan de septembro matene vi tien venis, ĉu estis tie ia nekutima malordo? Sciu, io renversita aŭ elrompita pordo -?"

"Malordo," opiniis sinjorino Marešová, "malordo estis tie, kiel ĉiam. Sinjoro Benda estis porkulo, sinjoro. Sed alie nekutima malordo tie ne estis, nepre ne. Sed diru al mi, kien li povis iri, havante eĉ ne ŝelkon sur la korpo?" Doktoro Goldberg sciis same malmulte kiel ŝi; kun la plej sombraj zorgoj ĉi-foje li turniĝis al polico.

"Nu bone," diris policoficisto, kiam doktoro Goldberg rakontis al li ĉion, kion li sciis, "ni serĉos lin. Sed laŭ tio, kion vi diris, ke dum la tuta semajno li estis ŝlosita hejme, nerazita kaj nelavita, kuŝadis sur sofo, drinkis konjakon kaj poste perdiĝis nuda kiel aŝanto, tio aspektus, sinjoro, hm, kiel - " "- deliro," elbuŝigis doktoro Goldberg. "Jes," diris la oficisto. "Ni diru memmortigo en senskonfuzo. Sciu, ĉe li tute mi ne mirus." "Sed ie devus esti trovebla lia korpo," opiniis doktoro Goldberg necerte.

Nyní, když se začali o Bendovo zmizení starat také jiní lidé, šel doktor Goldberg znovu za paní Marešovou. "Poslouchejte, matko," řekl, "nevíte, jaké měl pan Benda na sobě šaty, když odešel ze svého bytu?"

"Žádný," pravila paní Marešová; "to je právě to, co se mně nelíbí. Neměl žádný šaty. Já znám všechny jeho vobleky a všechny visej v bytě, – ani jedny katě nechyběj." "Že by byl odešel jenom v prádle?" mýnil doktor Goldberg velmi zaražen. "Ani v prádle ne," prohlásila paní Marešová, "ani v botách; to je to divný, pane. Viděj, já mám zapsanej každej jeho kousek prádla, protože to nosím do prádelny; teď to vyprali a já jsem mu to srovnala a spočítala; má tam vosmnáct košil, nechybí ani jedna, ani jeden kapesník, no dočista nic. Jenom jeden kufírek je pryč, co s sebou vždycky bere. Jestli vodošel, tak musel bejt krom ty drahý duše docela nahej."

Doktor Goldberg vypadal velmi povážlivě. "Matko," řekl, "když jste tam druhého září ráno přišla, nebyl tam nějaký zvláštní nepořádek? Víte, něco pokáceného nebo vylomené dveře – ?" "Nepořádek," mýnila paní Marešová, "to von tam nepořádek byl, jako vždycky. Von pan Benda byl takový čuně, pane. Ale jináč tam nebyl žádnéj nepořádek, to zas ne. Ale řeknou mně, kam moh jít, když neměl na těle ani tu kšandu?" Doktor Goldberg to ovšem věděl tak málo jako ona; a s nejpochmurnějšími starostmi se obrátil tentokrát už na policii.

"Nu dobře," řekl policejní úředník, když mu dr. Goldberg vyklopil všechno, co věděl, "budeme pátrat. Ale podle toho, co jste povídal, že byl po celý týden zamčen doma, neholený a nemytý, válel se na pohovce, chlastal koňak a pak se ztratil nahý jako ašant, to by, pane, koukalo, hm, na nějaké –" "– delirium," vyhrkl doktor Goldberg. "Ano," řekl úředník. "Řekněme na sebevraždu v pomatení smyslů. Víte, u něho bych se tomu nedivil." "Ale to by se snad našlo jeho tělo," mýnil dr. Goldberg nejistě.

"Kaj poste, ĝis kie li povus veni nuda? Kaj kial li kunprenus la kofreton? Kaj la veturilo atendinta antaŭ la domo - Sinjoro, tio ŝajnas esti plivere fuĝo."

"Kaj ŝuldojn li ne havis?" rememoris la oficisto. "Ne," rapidis diri la doktoro; Benda ja havis tiom da ŝuldoj, kiom da fojno, sed en tio li ne vidis ian tragedion. "Aŭ... ni diru, ian personan skandalon... malfeliĉan amon, aŭ sifilison, aŭ entute ian pli grandan zorgon?" "Laŭ mia scio, nenion," opiniis doktoro Goldberg hezite; unu du aferojn li rememoris ĉe tio, sed silentis - cetere ĉio ĉi apenaŭ povus havi ion komunan kun malapero de aktoro Benda.

Tamen revenante hejmen de la polico - memkomprene, la polico faros ĉion poveblan - li rekonsideris, kion li sciis tiurilate pri Benda. Da tio ne estis multe: 1. Benda havis ie en eksterlando leĝan edzinon, pri kiu li tute ne zorgis; 2. li vivtenis por si iun knabinon en Holešovice; 3. li havis amrilaton, kaj nome tiel nomatan skandalan rilaton al sinjorino Greta, edzino de grandfabrikanto Korbela; la sinjorino necedeme volis ludi en teatro kaj tial sinjoro Korbela financis kelkajn filmojn, en kiuj lia edzino kompreneble ludis la ĉefrolon. Estis do konate, ke Benda estas amanto de sinjorino Greta, ke sinjorino Greta veturadas al li kaj jam ne plu estas singarda tiel, kiel decus. Cetere Benda pri tiuj aferoj neniam parolis; li malŝatis tion duone pro majesta digno kaj duone pro cinikismo, kiu doktoron Goldberg frostotremigis. Ne, diris al si la doktoro senespere, en privataj aferoj de Benda neniu orientiĝas. Mi vetas, ke en tio estas iu abomena historio: sed nun ĝi estas afero de la polico.

Doktoro Goldberg nature ne sciis, kion la polico entreprenas kaj kiaj estas ĝiaj vojoj: li atendis kun kreskanta rezigno ricevotan informon. Dume jam pasis monato depost malapero de aktoro Benda, kaj pri Jan Benda oni komencis paroli en paseo.

Foje vespere renkontis doktoro Goldberg maljunan aktoron Lebduška; kaj dum la interparolo ili komencis, memkomprene, paroli pri Benda.

"A potom, jakpak daleko by mohl dojít nahý? A proč by bral s sebou kufřík? A ten vůz, co čekal u domu – Pane, to vypadá spíš jako útěk."

"A co," vzpomněl si úředník, "dluhy neměl?" "Ne," řekl honem doktor; on sice Jan Benda měl dluhů jako kvítí, ale nebral je nikdy tragicky. "Nebo... řekněme nějaký osobní skandál... nešťastnou lásku, nebo lues, nebo vůbec nějakou větší starost?" "Pokud vím, nic," mýnil doktor Goldberg váhavě; na jednu nebo dvě věci si přitom vzpomněl, ale spolkl je, – ostatně to všecko stěžní mělo co dělat s nepochopitelným zmizením herce Bendy.

Nicméně když se vracel z policie domů – to se rozumí, policie učiní, co je v její moci –, převaloval v hlavě, co věděl o Bendovi po téhle stránce. Nebylo toho mnoho: 1. Benda měl někde za hranicemi legitimní manželku, o kterou se ovšem nestaral; 2. vydržoval si jakési děvče v Holešovicích; 3. měl poměr, a sice takzvaný pohoršující poměr s paní Grétou, ženou velkého fabrikanta Korbela; ta paní Gréta chtěla mermomocí hrát divadlo, a proto pan Korbela financoval nějaké filmy, ve kterých jeho paní hrála ovšem hlavní role. Bylo tedy známo, že Benda je milencem paní Gréty, že paní Gréta za ním jezdí a už si ani nedává tak pozor, jak by se slušelo. Ostatně Benda nikdy o těchhle věcech nemluvil; pohrdal vším zpola s veličenskou důstojností a zpola s cynismem, který Goldberga mrazil. Ne, řekl si doktor beznadějně, v soukromých věcech Bendových se nikdo nevyzná. Ať se propadnu, není-li v tom nějaká ošklivá historie; ale teď už je to věc policie.

Doktor Goldberg ovšem nevěděl, co policie podniká a jaké jsou její cesty: čekal s rostoucí malomyslností, že dostane nějakou zprávu. Zatím už uplynul měsíc od zmizení herce Bendy a o Janu Bendovi se začalo mluvit v minulém čase.

Jednou kvečer potkal doktor Goldberg starého herce Lebduška; a jak se tak zapovídali, přišla řeč, to se rozumí, na Bendu.

"Jes ja, li estis aktoro," rememoris maljuna Lebduška. "Mi memoras lin, kiam li estis proksimume dudekkvinjara. Damna bubo, kiel li rolis Osvaldon! Sciu, ke junaj medicinistoj iradis rigardi en teatron, kiel aspektas paralizo. Tiam li ludis unuafaje reĝon Lear; aŭskultu, mi ne scias, kiel li ludis, ĉar senĉese mi rigardis liajn manojn. Li havis manojn kiel okdekjara oldulo, magrajn, sekajn, povrajn manojn - ĝis nun mi ne komprenas, kiel li preparis siajn manojn. Ja, ankaŭ mi scias min maski; sed tion, sinjoro, post Benda neniu faros; tion aprecos nur aktoro."

Al doktoro Goldberg la aŭskultado de la aktora nekrologo pri Jan Benda kaŭzis melankolian delicon. "Li estis ege serioza ludanto, sinjoro," ĝemis Lebduška. "Kiel li ĉikanis la teatron tajloron! 'Mi ne ludos la reĝon,' li kriis, 'se vi alkudros sur la jakon tiajn aĉajn punktojn!' Benda toleris sur si nenian teatron trompaĵon. Kiam li estis ludonta Otelon, li trabutikis ĉiujn antikvaĵ-bazarojn, ĝis li trovis ian malnovan renesancan ringon; kaj ĝin li havis surfingre, kiam li ludis Otelon. Li diradis, ke plej bone li ludas, se li havas sur si ion aŭtentikan. Tio ne estis jam ludo, tio estis ja - metamorfozo," diris Lebduška necerte, ne sciante, ĉu li uzis la ĝustan vorton. "Kaj ludante, en interaktoj ĉiam li estis krudmora, kiel masonestro kaj ŝlosadis sin en sia vestejo, por ke neniu eletosigu lin el la rolo. Tial li tiom trinkis, ĉar tio superis lian nervostaton," opiniis Lebduška mediteme. "Mi iras ĉi tie en kinejon, sinjoro," li diris adiaŭante.

"Mi iros kun vi," proponis doktoro Goldberg, ne sciante, kiel pasigi vesperon. Tie estis ludata ia marista filmo, sed doktoro Goldberg preskaŭ ne perceptis ĝin; preskaŭ larmokule li aŭskultis, kiel maljuna Lebduška babilas pri Jan Benda.

"Li ne estis aktoro," diris Lebduška, "li estis satano mem; al li ne sufiĉis unu vivo, jen la afero. En la vivo li estis porkulo, sinjoro doktoro; sed sur scenejo li estis efektiva reĝo aŭ ĉifonulo. Sinjoro, kiel li sciis mangesti, kvazaŭ la tutan vivon li ordonus; kaj dume lia patro estis migranta tondil-akrigisto.

"Panečku, to byl herec," vzpomínal starý Lebduška. "Já ho pamatuju, když mu bylo asi pětadvacet let. Zatracený kluk, ten hrál Osvalda! Víte, že se tam chodili dívat mladí medikové, jak vypadá paralýza? Tehdy hrál poprvé krále Leara; poslouchajte, já ani nevím, jak hrál, protože jsem se mu pořád díval na ruce. On vám měl ruce jako osmdesátiletý dědek, takové vyzáblé, vysušené, ubohé ruce – teda tomu podnes nerozumím, jak si udělal ty ruce. Já přece se taky dovedu maskovat; ale tohle, pane, po Bendovi neudělá nikdo; to ocení jenom herec."

Doktoru Goldbergovi působilo melancholickou rozkoš naslouchat tomu hereckému nekrologu na Jana Bendu. "To byl důkladný hráč, pane," vzdychl Lebduška. "Jak vám sekýroval divadelního krejčího! Já vám nebudu hrát krále, křičel, když mně dáte na kabát takové šófl krajky! To on nesnesl na sobě žádný divadelní švindl. Když měl hrát Othella, tak vám proběhal všechny starožitnické krámy, až našel takový starý renesanční prsten; a ten musel mít na prstě, když hrál Othella. On říkal, že se mu líp hraje, když má na sobě něco pravého. To ani nebyla hra, to bylo zrovna... převtělení," řekl Lebduška nejistě, nevěda, užil-li pravého slova. "A když hrál, byl vždycky v pauzách sprostý jako polír a zamykal se ve své šatně, aby ho nikdo nevytrhoval z toho stavu. Proto on tolik pil, že mu to šlo na nervy," mínil Lebduška zamyšleně. "Já jdu tadyhle do kina, pane," řekl na rozloučenou.

"Já půjdu s vámi," navrhl doktor Goldberg, nevěda, jak by utloukl večer. Dávali tam nějaký námořnický film, ale doktor Goldberg ani dobře nevěděl, oč jde; skoro se slzami v očích poslouchal, jak starý Lebduška žvatlá o Janu Bendovi.

"To nebyl herec," povídal Lebduška, "to byl zrovna čert; jemu nestačil jeden život, to je to. V životě byl prase, pane doktore; ale na jevišti, to byl skutečný král nebo skutečný šupák. Pane, jak on dovedl kynout rukou, jako by po celý život jenom poroučel; a zatím jeho táta byl potulný brusič.

Jen, vidu tiun averiinton, li estas sur dezerta insulo kaj havas pritonditajn ungojn, idioto. Vidu, la barbo estas nur algluita. Se Benda lin ludus, li kreskigus al si veran barbon, kaj sub la ungoj li havus veran malpuraĵon... Kio, sinjoro doktoro, kio okazis al vi tiel subite?"

"Pardonu," balbutis doktoro Goldberg leviĝante, "mi rememoris ion. Mi dankas vin," kaj jam kuris el la kinejo. Benda kreskigus al si veran barbon, li ripetis. Benda kreskigus al si veran barbon! Kial la ideo ne venis al mi pli frue!

"Ek al ĝendarma komandejo!" li ekkriis, ĵetante sin en la unuan taksion; kaj kiam li penetris al ĉefĝendarmoj havanta noktan deĵoron, li postulis kun tre laŭta krio kaj petado, ke ili pro ĉio en la mondo, tuj, sed tuj konstatu, ĉu la duan de septembro aŭ iam poste estis trovita kadavro de nekonata vagulo, jes, kie ajn, mi petas! Kontraŭ la atendado la ĉefĝendarmoj vere iris ien rigardi aŭ demandi, plivere pro enuo ol pro speciala fervoro aŭ intereso; dume doktoro Goldberg ŝvitis pro ekscito, ĉar li antaŭvidis ion teruran.

"Jes, sinjoro," diris la ĉefĝendarmoj revenante, "la duan de septembro matene trovis arbargardisto en arbaroj de Křivoklát kadavron de nekonata vagulo, proksimume kvardekjara; la trian de septembro oni eltiris el Elbo apud Litoměřice kadavron de nekonata viro, aĝo proksimume tridek jarojn, en la akvo li estis almenaŭ du semajnojn; la dekan de septembro apud Havlíčkův Brod nekonata pendumito; aĝo proksimume sesdek jarojn..." "Pri la vagulo oni ne scias iom pli?" demandis doktoro Goldberg senspire. "Murdo," diris la ĉefĝendarmoj, rigardante atente la ekscititan doktoron. "Laŭ raporto de ĝendarmejoj li havis la kranion frakasita per stumpa objekto. Sekca ekspertizo: alkoholulo, kaŭzo de morto cerbolezo. Jen la foto," diris la ĉefĝendarmoj kaj aldiris fakule: "Damne, tiun oni deformis!"

Helejte, tady ten trosečník; je na pustém ostrově a přitom má ostríhané nehty, blbec jeden. Vidíte, jak ty fousy má jenom přilepené? Kdyby ho hrál Benda, tak by si nechal narůst pravé fousy, a za nehty by měl pravou špinu... Copak, pane doktore, copak se vám tak najednou stalo?"

"Promiňte," koktal Goldberg, vstáváje, "ale já jsem si na něco vzpomněl. Děkuju vám," a už běžel z biografu. Benda by si byl nechal narůst pravé vousy, opakoval. Benda by si nechal narůst pravé vousy! Že mě to nenapadlo dřív!

"Na četnické velitelství!" křikl, vrhaje se do nejbližšího taxíku; a když pronikl k strážmistřovi, který měl noční službu, domáhal se s velkým křikem a prošením, aby mu pro živého boha hned, ale hned zjistili, nebyla-li druhého září nebo někdy potom nalezena kdekoliv mrtvola neznámého vandráka, ano, kdekoliv prosím! Proti všemu očekávání se onen strážmistr šel opravdu někam podívat nebo zeptat, spíše z dlouhé chvíle nežli ze zvláštní horlivosti nebo zájmu; zatím se doktor Goldberg potil rozčilením, neboť mu svítalo něco hrozného.

"Tak, pane," pravil strážmistr, vraceje se, "druhého září ráno našel hajný v křivoklátských lesích mrtvolu neznámého tuláka, asi čtyřicet let; třetího září byla vytažena u Litoměřic z Labe mrtvola neznámého muže, věk asi třicet let, byl ve vodě aspoň čtrnáct dní; dne desátého září u Německého Brodu neznámý oběšenec, věk asi šedesát let..." "O tom tulákovi není nic bližšího?" ptal se doktor Goldberg bez dechu. "Vražda," řekl strážmistr, koukaje pozorně na rozčileného doktora. "Podle hlášení četnické stanice měl lebku rozbitou tupým předmětem. Pitevní nález je: alkoholik, příčina smrti poranění mozku. Tady je fotografie," pravil strážmistr a dodával znalecky: "Hergot, toho zřídili!"

Sur la foto videblis korpo de viro ĝis talio; li estis ĉifone vestita, kun disbutonumita kalikota ĉemizo; tie, kie oni havas frunton kaj okulojn, estis nur terura tufo de har-koagulaĵo kaj de io, kio eble estis haŭto aŭ ostoj; nur la hirta stopla mentono kaj la duonfermita buŝo havis ion komuna kun la homo. Doktoro Goldberg tremis kiel folio. Ĉu li estas ... ĉu li eble povas esti Benda?

"Ĉu ... li havis ian rimarkindan signon?" li elbuŝigis konsternite. La ĉefĝendarmo enrigardis iun akton. "Hm. Grandeco unu metron sepdek ok, grizeta hararo, la dentoj okulfrape kariaj ..."

Doktoro Goldberg laŭte respiris: "Do tiu ne estas li, Benda havis la dentojn sanajn kiel besto. Tiu ne estas li. Pardonu," li balbutis feliĉege, "ke mi ĝenis vin, sed tiu ne povas esti li. Tute ekskludite." Ekskludite, li diris al si malstreĉe, revenante hejmen. Eble li vivas; eble, miadio, eble li sidas jam en Olimpio aŭ ĉe Nigra Katarina... Tiunokte doktoro Goldberg entreprenis migradon tra la nokta Prago; li trinkis sian glason da akvo en ĉiuj lokaloj, kie iam reĝis Benda, kaj okulis tra siaj okulvitroj ĉiujn angulojn, sed Benda nenie.

Ĉirkaŭ la mateno doktoro Goldberg paliĝis, laŭte nomis sin idioto kaj kuregis en sian garaĝon. Matene li estis jam ĉe iu distrikt-administrejo kaj igis veki la distriktestron; feliĉe montriĝis, ke tiun sinjoron foje li propramane ektomiis kaj kunkudris kaj transdonis al li rememore apendicon en absoluta alkoholo. Sekve de tiu ne supraĵa konatiĝo post du horoj li havis enmane permeson por elhumigo kaj alrigardis ĉe flanko de tre ĉagrena distrikta kuracisto eltombigadon de kadavro de nekonata vagulo.

"Mi diras al vi, sinjoro kolego," murmuris la distrikta kuracisto, "pri li demandis jam la praga polico; nepre estas ekskludite, ke li estus Benda. Ja li estis tute malpurega vagabondo." "Ĉu li havis pedikojn?" demandis doktoro Goldberg kun intereso. "Tion mi ne scias," respondis la doktoro kun abomeno. "Sinjoro kolego, nun nenion jam vi povas konstati ĉe li; mi petas vin, se li estas monaton en la tero -"

Na fotografii bylo vidět tělo muže po pás; byl oblečen ve všivé hadry, s rozhalenou kalikovou košilí; tam, kde lidé mají čelo a oči, byl jen strašný chumáč spečených vlasů a něčeho, co snad byla kůže nebo kosti; toliko ježatá, strniskem zarostlá brada a pootevřená ústa se podobaly ještě člověku. Doktor Goldberg se třásl jako list. Je to... mohl by to snad být Benda?

"Měl... měl nějaké zvláštní znamení?" vypravil ze sebe zdrceně. Strážmistr se podíval do nějakého lejstra. "Hm. Velikost metr sedmdesát osm, vlasy prošedivělé, zuby nápadně zkažené..."

Doktor Goldberg si hlasitě oddechl: "Tak to není on. Benda měl zuby zdravé jako zvíře. To není on. Odpusťte," breptal blaženě, "že jsem vás obtěžoval, ale to nemůže být on. To je vyloučeno." To je vyloučeno, říkal si s úlevou, když se vracel domů. Možná, že je živ; snad, bože, snad už sedí v Olympii nebo u Černé Káči... Té noci doktor Goldberg podnikl zase tah noční Prahou; pil svou sklenici vody ve všech lokálech, kde kdysi kraloval Jan Benda, a brejllil svými zlatými okuláry po všech koutech, ale Benda nebyl nikde.

K ránu doktor Goldberg zbledl, řekl si nahlas, že je idiot, a hnál se do své garaže. Ráno už byl u jednoho okresního hejtmanství a nechal si vzbudit hejtmana; naštěstí se ukázalo, že toho pána už jednou vlastnoručně vykuchal a zašil a odevzdal mu na památku slepé střevo naložené v lihu. Následkem této nikoliv povrchní známosti měl za dvě hodiny v rukou exhumační povolení a přihlížel po boku velmi rozmrzelého okresního lékaře vykopávání mrtvoly neznámého tuláka.

"Říkám vám, pane kolego," bručel okresní lékař, "na toho již se ptala pražská policie; to je naprosto vyloučeno, že by to byl Benda. Vždyť to byl úplně špinavý lump." "Měl vši?" ptal se doktor Goldberg se zájmem. "To nevím," řekl lékař s odporem. "Pane kolego, teď již na něm nic nepoznáte; prosím vás, když je to měsíc v zemi -"

Kiam la tombo estis malfermita, devis doktoro Goldberg aĉetigi brandon; alie li ne povus postuli de tombistoj, ke ili levu kaj alportu en kadavrejon tion neeldireblan, kio estis kuŝinta sur fundo de tombo, enkudrita en sako.

"Iru mem rigardi," bruskis la distrikta kuracisto je doktoro Goldberg kaj restis antaŭ la kadavrejo, fumante fortan cigaron. Mallonge post tio ŝanceliĝis el la kadavrejo doktoro Goldberg mortpala.

"Iru rigardi," li diris raŭke, reiris al la korpo kaj montris lokon, kio iam estis homa kapo. Doktoro Goldberg forŝovis per pinĉileto ion, kio iam estis la lipoj; aperis abomene kariaj dentoj aŭ plivere nur flavaj dentrestaĵoj, brilantaj el la nigra kario. "Bone rigardu," elspiris Goldberg, enigis la pinĉileton inter la dentojn kaj eltiris de ili pecon da nigra kario. Sub ĝi montriĝis du blankbrilaj, fortaj incizivoj. Sed doktoro Goldberg plu ne eltenis; li fuĝis el la kadavrejo, tenante ambaŭmane la kapon. Kiam post tempeto li revenis al la distrikta kuracisto, li estis pala kaj terure trista.

"Jen vi havas la okulfrape kariajn dentojn, sinjoro kolego," li diris mallaŭte. "Tio nur estis nigra peĉo, kiun la aktoroj gluas sur la dentojn, kiam ili ludas oldulojn aŭ vagulojn. Tiu malpura vagabondo estis aktoro, sinjoro kolego," kaj senespere mangestis, aldirante: "Kaj krome ankoraŭ granda aktoro."

Tiutage aperis doktoro Goldberg ĉe fabrikanto Korbel; tiu estis granda kaj fortika homo kun galoŝforma mentono kaj korpo kiel piliero. "Sinjoro," alparolis lin doktoro Goldberg, rigardante koncentrite tra siaj rondaj okulvitroj, "mi iras al vi... en afero de aktoro Benda."

"Aj," diris la fabrikanto kaj krucis la manojn post la kapo. "Ĉu li jam denove troviĝis?" "Parte," diris doktoro Goldberg. "Mi opinias, ke tio interesos vin... jam pro la filmo, kiun vi volis fari kun li... nome financi. "Pro kiu filmo?" demandis la granda viro indiferente. "Mi scias pri nenio."

Když byl hrob vykopán, musil doktor Goldberg poslat pro kořalku; jinak by nedostal hrobníky k tomu, aby zvedli a donesli do márnice to nevýslovné, co leželo na dně hrobu, zašito v pytli.

"Jděte se na to podívat sám," utrl se okresní lékař na doktora Goldberga a zůstal před márnicí, kouře silné cigáro. Za chvíli se motal z márnice doktor Goldberg, na smrt bledý.

"Pojďte se podívat," řekl chřaptivě, šel zpátky k tomu tělu a ukazoval na místo, které bylo kdysi hlava člověka. Tu odhrnul doktor Goldberg pinzetou to, co byly kdysi rty; objevily se odporně zkažené zuby, nebo spíše jen žluté kousky zubů, blýskající z černé karies. "Tak se dobře podívejte," vydechl Goldberg, zajel pinzetou mezi zuby a vyňal z nich kus černého kazu. Pod ním se ukázaly dva skvoucí, silné řezáky. Ale děle to doktor Goldberg nevydržel; utekl z márnice, drže se oběma rukama za hlavu. Když se za chvíli vrátil k okresnímu lékaři, byl bledý a strašlivě smutný.

"Tak to máte ty nápadně zkažené zuby, pane kolego," řekl tiše. "To byla jenom černá smola, co si herci přilepují na zuby, když hrají dědky nebo vandráky. Ten špinavý lump byl herec, pane kolego," a beznadějně mávl rukou, dodávaje: "A k tomu ještě veliký herec."

Toho dne objevil se doktor Goldberg u továrníka Korbela; byl to veliký a silný člověk s bradou jako galoše a tělem jako pilíř. "Pane," řekl mu doktor Goldberg, vyhlížeje soustředěně ze svých kulatých skel, "já k vám jdu... ve věci herce Bendy."

"Ale," děl fabrikant a založil ruce za hlavou. "Už se zas našel?" "Částečně," pravil doktor Goldberg. "Já myslím, že vás to bude zajímat... už kvůli tomu filmu, který jste s ním chtěl dělat... totiž financovat." "Kvůli jakému filmu?" ptal se veliký muž lhostejně. "Já o ničem nevím."

"Mi opinias tiun filmon," diris doktoro Goldberg obstine, "en kiu Benda estis rolonta vagabondon... kaj sinjorino Greta la virinan ĉefrolon," opiniis la doktoro senkulpe.

"Tio ne rilatas vin," ekgrumblis Korbel. "Plej versimile Benda kredigis ion al vi ... Tio estis antaŭtempaj paroloj...ia simila plano eble estis ... Tion diris Benda al vi, ĉu?"

"Nepre ne! Vi ordonis ja, ke antaŭ neniuj li tion mencienu; tiajn sekretojn kun tio faris vi. Sed sciuj, Benda en la lasta semajno de sia vivo kreskigis al si barbon kaj hararaĉon, por aspekti vagabonde. Benda faris tiajn detalojn ege funde, ĉu?" "Mi ne scias," hakfinis la fabrikanto. "Ĉu ankoraŭ ion vi deziras?"

"Do la filmo estis farota la duan de septembro, ĉu? La unua sceno estis ludota en arbaroj apud Křivoklát ĉe la mateniĝo; la vagabondo vekigis sur rando de senarbejo... en matena nebulo... elŝutas foliojn kaj pinglaron el sia ĉifonvestaĵo... Mi imagas al mi, kiel Benda ludus tion. Mi scias, ke li vestiĝis per la plej aĉaj ĉifonoj kaj ŝuaĉoj; da tio li havis en subtegmento plenan keston. Tial post lia... malapero mankis eĉ ne ununura lia tolaĵo kaj vestaĵo - miadio, kial neniuj ekhavis la ideon! Sinjoro, estis atendebla, ke li vestos sin ĝis la lasta ĉifaĵo ĉe manikoj kaj ŝnureto ĉirkaŭ la talio kiel vera vagabondo; tio jam estis lia maroto tiom zorge sin kostumi."

"Kio plu?" diris la granda viro kaj kliniĝis pli en ombron. "Nome mi ne komprenas, kial ĉion ĉi vi rakontas al mi."

"Ĉar la duan de septembro proksimume je la tria matene," daŭrigis doktoro Goldberg obstine, "vi alveturis por li... plej versimile per elpruntita, sed certe fermita aŭto; mi opinias, ke stiris via frato, ĉar li estas sportulo kaj estas silentema. Kiel jam estis interkonsentite kun Benda, vi ne iris supren, sed vi hupis malsupre. Poste venis Benda... aŭ ni diru pli precize, malpura kaj hirta vagabondo. 'Rapide,' vi diris al li, 'kameraisto veturis jam antaŭe. Kaj vi veturis al arbaro apud Křivoklát.'" "Aŭtonumeron versimile vi ne scias," diris ironie la viro en ombro.

"Já míním ten film," řekl Goldberg tvrdohlavě, "co v něm měl Benda hrát tuláka... a paní Gréta hlavní ženskou roli. Vlastně se to mělo točit kvůli paní Grétě," mínil doktor nevinně.

"Po tom vám nic není," zavrčel Korbel. "Nejspíš vám Benda něco namluvil... To byly předčasné řeči. Nějaký takový plán snad byl... To vám říkal Benda, že?"

"Kdepak! Vy jste mu přece nařídil, že o tom nesmí nikomu ani pipnout; dělali jste s tím takové tajnosti. Ale víte, on si Benda nechal poslední týden svého života narůst vousy a pačesy, aby vypadal jako vandrák. On Benda bral takové detaily moc důkladně, že?" "Nevím," ut'al továrník. "Přejete si ještě něco?"

"Tak ten film se měl točit druhého září, co? První scéna se měla brát v křivoklátských lesích za úsvitu; tulák se probouzí na kraji mýtiny... v ranních mlhách... vytřepává si listí a jehličí z hadrů... Já si tak představuju, jak by to byl Benda zahrál. Já vím, že si oblékl ty nejhorší hadry a škrpály; on toho měl na půdě plnou bednu. Proto po jeho... zmizení nechyběl ani kousek z jeho prádla a šatů – propána, že to nikoho nenapadlo! Pane, to se dalo čekat, že se vystrojí do posledního cancouru u rukávů a provázku kolem pasu jako pravý šupák; to už tak byl jeho koníček, dát si tak záležet na kostýmu."

"A co dál?" řekl veliký muž a naklonil se víc do stínu. "Já totiž nechápu, proč mně to všechno povídáte."

"Protože druhého září asi ve tři hodiny ráno," pokračoval doktor Goldberg tvrdošijně, "jste pro něj přijel... nejspíš vypůjčeným, ale rozhodně zavřeným autem; já myslím, že řídil váš bratr, protože je sportsman a nenadělá mnoho řečí. Jak bylo s Bendou smluveno, nešel jste nahoru, ale troubil jste dole. Za chvíli přišel Benda... nebo řekněme přesněji, špinavý a ježatý tulák. Tak honem, řekl jste mu, operatér už jel napřed. A jeli jste do křivoklátských lesů." "Číslo vozu patrně nevíte," řekl muž ve stínu ironicky.

"Se mi scius ĝin, vi estus jam arestita," diris doktoro Goldberg tre klare. "Ĉe mateniĝo vi estis jam surloke; estas senarbejo aŭ plivere bosko de centjaraj kverkoj - belega scenejo, sinjoro! Mi opinias, ke via frato restis ĉe la aŭto sur la ŝoseo kaj ŝajnis, kvazaŭ li riparus ion ĉe la motoro. Vi kondukis Benda'n kvarcent paŝojn for de la vojo kaj tie vi diris al li: 'Jen la loko.' - 'Kaj kie estas la kameraisto?' subite rememoris Benda. Kaj tiumomente vi ekbatis lin unuafoje."

"Per kio?" aŭdiĝis la viro en ombro. "Per plumba mortigaĵo," diris doktoro Goldberg. "Ĉar ŝraŭbturnilo je tia kranio, kian Benda havis, estus tro leĝera; kaj vi volis frakasi ĝin ĝis nerekonblo. Kaj kiam vi finbatis lin, vi revenis al aŭto. "Prete?" demandis via frato; sed probable nenion vi diris, ĉar murdi homon ne estas bagatelo."

"Vi freneziĝis," bruskis la viro en ombro. "Mi ne freneziĝis," diris doktoro Goldberg. "Nur mi volis rememorigi al vi, kiel ĝi versimile okazis. Vi volis forigi Benda'n pro la skandalo kun sinjorino Greta; sinjorino Greta miskondutis jam tro publike."

"Vi judo fetora," ektondris la viro en fotelo, "kion vi permesas al vi -" "Mi ne timas vin," diris doktoro Goldberg, ĝustigante la okulvitrojn, por aspekti pli severe. "Super mi, sinjoro, vi ne havas povon, eĉ se vi estus kiel eble plej riĉa. Per kio vi povas noci al mi? Maksimume vi ne lasos operacii ĉe mi la apendiciton; kaj tion, sinjoro, nepre mi ne konsilus al vi."

La viro en ombro ekridis mallaŭte. "Aŭskultu, homo," li diris kun ia gajo, "se vi sciis kun certeco nur dekonon de tio, kion vi ĉi tie parolacis, vi ne irus al mi, sed al la polico, ĉu?"

"Jen ĝuste tio," diris doktoro Goldberg tre serioze. "Sinjoro, se nur dekonon mi povus pruvi, mi ne estus ĉi tie. Mi opinias, ke neniam oni povos tion pruvi; ankaŭ tion, ke la putriĝinta vagabondo estis Benda, jam ne estas pruvebla. Ĝuste tial mi venis." "Minaci, ĉu?" lanĉis la viro en la fotelo kaj estis aletendanta la manon al sonorilbutono.

"Kdybych to věděl, tak by vás už zatkli," pravil doktor Goldberg velmi jasně. "Za úsvitu jste byli na místě; je to taková mýtina nebo spíš háj stoletých dubů – překrásná scenérie, pane! Já myslím, že váš bratr zůstal u vozu na silnici a dělal, jako by něco spravoval na motoru. Vy jste vedl Bendu čtyři sta kroků od cesty a tam jste řekl: Tak, tady je to. A kde je operatér? vzpomněl si najednou Benda. A v tom okamžiku jste mu zasadil první ránu."

"Čím?" ozval se muž ve stínu. "Olověným zabijákem," řekl doktor Goldberg. "Protože francouzský klíč by byl na takovou lebku, jako měl Benda, příliš lehký; a vy jste ji chtěl rozmlátit k nepoznání. Když jste ho dobil, šel jste zpátky k vozu. Hotovo? ptal se váš bratr; ale vy jste asi nic neřekl, protože zavraždit člověka není maličkost."

"Vy jste se zbláznil," zahučel muž ve stínu. "Nezbláznil. Já jsem vám chtěl jenom připomenout, jak to asi bylo. Vy jste chtěl Bendu odstranit kvůli tomu skandálu s paní Grétou; paní Gréta už vyváděla tuze veřejně."

"Vy smradlavý žide," zaburácel muž v lenošce, "co vy si to dovolujete –" "Já se vás nebojím," řekl doktor Goldberg, narovnával si brýle, aby vypadal přísněji. "Na mne si, pane, nepřijedete, kdybyste byl sebebohatší. Čím mně můžete uškodit? Ledaže si u mne nedáte řezat slepé střevo; a já bych vám to, pane, ani neradil."

Muž ve stínu se dal do tichého smíchu. "Poslouchejte, člověče," řekl s jakousi veselostí, "kdybyste jen desetinu z toho, co jste mně tady nažvanil, bezpečně věděl, nešel byste s tím ke mně, ale na policii, že?"

"To je právě to," řekl velmi vážně doktor Goldberg. "Pane, kdybych mohl jen desetinu dokázat, nebyl bych tady. Myslím, že se to nikdy nedokáže; ani to, že ten shnilý tulák byl Benda, se už nedokáže. Právě proto jsem přišel." "Vyhržovat, ne?" hodil muž v lenošce a sahal po elektrickém zvonku.

"Ne, sed angorigi vin. Sinjoro, certe vi ne havas tro senteman konsciencon; por tio vi estas tro riĉa. Sed tio, ke iu alia scias la tutan teruron, ke iu scias, ke vi estas murdinto, ke via frato estas murdinto, ke vi murdis aktoron Benda, filon de tranĉilakrigisto, komedianton, vi du fabrikantoj, sinjoro, tio ĝis fino de la vivo perturbo vian grandsinjoran ekvilibron. Dum vi vivos, vi du ne havos trankvilon. Sinjoro, mi volus vin vidi sur pendumilo; almenaŭ dum mi vivos, mi amarigos vian vivon...

Benda estis mava besto; sinjoro, mi scias plej bone, kiel malbona li estis, orgojla, cinika, malĉasta kaj kion vi volas; sed li estis artisto. Ĉiuj viaj milionoj estas nenio kompare al tiu ebria komedianto; per ĉiuj viaj milionoj vi ne kapablas prezenti la reĝan mangeston - la mensogan kaj tamen mirigan grandecon de homo -"

Doktoro Goldberg malespere manklakis. "Kiel nur vi tion povis fari? Sinjoro, neniam vi havos trankvilon, mi ne lasos vin forgesi! Ĝis fino de via vivo mi rememorigos vin: Ĉu vi memoras aktoron Benda? Sinjoro, kia artisto li estis, ĉu vi aŭdas?"

"Ne, ale straŝit. Pane, vy jistě nemáte tuze citlivé svědomí, na to jste příliš bohatý. Ale to, že někdo jiný zná tu celou hrůzu, že někdo ví, že jste vrah, že váš bratr je vrah, že jste zavraždili herce Bendu, syna brusičova, komedianta, vy dva fabrikanti, pane, to do smrti poruší vaši velkopanskou rovnováhu. Pokud budu živ, vy dva nebudete mít pokoj. Pane, já bych vás chtěl vidět na šibenici; ale aspoň pokud budu živ, vás budu otravovat...

Benda byl zlé zvíře; pane, já vím nejlíp, jak byl zlý, nadutý, cynický, nestoudný a co chcete; ale byl umělec. Všecky vaše milióny nevydají za toho opilého komedianta; se všemi svými milióny nesvedete ten královský pokyn ruky – tu vylhanou, a přece úžasnou velikost člověka –"

Doktor Goldberg spráskl zoufale ruce. "Jak jste to mohl udělat? Pane, vy nikdy nebudete mít pokoj, já vás nenechám zapomenout! Do smrti vám budu připomínat: Pamatujete se na herce Bendu? Pane, to byl umělec, slyšíte?"